

ESPERANTO

KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Aperas monate sub la aŭspicio de la
FRANCA ASOCIO DE ESPERANTISTAJ EDUKISTOJ
(G. E. E.)

Redakto - Sekretario :

Dr. Andreo ALBAULT
rue des Feuillants
Lyon (Francio)



Eldono - Direktoro :

H. MICARD, Emerita Instruisto
Epineux - le - Séguin (Mayenne)
Francio

N° 7

JULIO

1957

Jara abono : 400 fr. fr., pagenda en Francio al
Edmond BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.), Francio.
Post-ĉek-konto : 1438-67 Nantes ;
aŭ al la landaj perantoj de I.P.R. (vidu 2-an kovrilpaĝon)
aŭ al la landaj perantoj kaj delegitoj de U.E.A.



Informoj el niaj Asocioj

Ni opinias ke la aperigo de la jenaj informoj utilos al niaj legantoj.

I.L.E.I.

Funkciuloj por la periodo 1955-58 :

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, 70, Av. Victor-Ségoffin, *Toulouse*, Francio.

Sekretario, Kasisto, Gvidanto de Centra Oficejo : F-ino Violet C. NIXON, 183, Woodlands Park Road, Bournville, *Birmingham*, 30, Anglio.

Konsilantoj : S-roj HEITMÜLLER, SVANTESSON, TACCANI.

Membro-Asocioj :

Aŭstrio, Britio, Francio, Germanio, Italio, Suomio, Svedio.

Aktivaj reprezentantoj en aliaj landoj :

Aŭstralio, Belgio, Danlando, Irlando, Izraelo, Japanio, Jugoslavio, Kanaria Insularo, Maroko, Norvegio, Portugalio, Urugvajo, Usono.

G.E.E. (800 anoj) (franca asocio)

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, Licea Lingvo-instruisto (adreso supre).

Generala Sekretario : S-ro F. THÉBAUD, C.C. Jeunes filles, *Caudry* (Nord)

Kasisto : S-ro E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, *Baugé* (M.-et-L.).

S.B.E.T. (192 anoj)

Prezidanto : S-ro A.J. HICKS el Parkstone.

Sekretario-Kasisto : F-ino Violet C. NIXON (adreso supre).

LANDA SEKCIO HESSEN de « Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj » (42 anoj)

Sekciestro : Kurt SCHÖNRICH, Hallgarter Str. 10, *Wiesbaden*.

INSTRUISTA SEKCIO ĉe « Slovenia Esperanto-Ligo » (... anoj).

Prezidantino : Sonjo TAVČAR.

Sin turni al Sek. de S.I.E.L. : Marinko GIVOJE, Poŝtako 275, *Ljubljana*.

E.U.G.I. (135 anoj) (germana asocio)

Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto : S-ro Heino HEITMÜLLER, (23) *Bremen* 8, Waller Heerstrasse 134.

AŭSTRALIA ESPERANTO-SOCIETO DE INSTRUISTOJ.

Prezidantino : D-ro SUMMERS.

Sekretariino : Gertrude POLLARD.

« GRAJNOJ EN VENTO », la *Tutmondaj Interlernejaj Rondo* Marcel ERBETTA, rue des Pins, 66, *Bienne-Biel* 7, Svislando.

INFORMOJN pri aliaj landaj edukistaj asocioj ni volonte publikigos.

ATENTU

Post Montevideo, ni devas repensi niajn metodojn. Nedubable ni devas penetri en ĉiujn kulturajn mediojn aŭ pereji.

Unu el la rimedoj penetri en tiujn mediojn estas en viaj manoj, karaj legantoj, kaj plie vi mem rikoltos la frukton de via laboro : traduku el la esperantaj gazetoj ĉiujn artikolojn, kiujn vi opinias interesaj por iu gazeto nacilingva... ĝuste elektita.

Tiel vi konigos nian lingvon en larĝaj tavoloj kaj certe vi ricevos nur helpon de koncernaj redakcioj, ĉar vi servos ilin per interesaj artikoloj de alilandaj aŭtoroj.

Traduko kaj Publikigo, en la pedagogia gazetaro, de la artikoloj de I.P.R. estas permesata. Nepre estu indikataj : 1° la aŭtoro (se eble lia logloko) 2° la fonto (lasante la titolon en Esperanto kaj jene : « Internacia Pedagogia Revuo », jaro, numero, paĝoj).

Ni petas vin sendi 2 pruvekzemplerojn al la redakcio (ni transsendos unu al la aŭtoro).

ESPERANTO KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Redaktejo : D-ro ALBAULT, 8, avenue Et.-Billières, Toulouse, Francio.

Administrejo (abonoj, ktp.) : E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M-et-L.), Francio.

Eldonejo : H. MICARD, Emerita Instruisto, Epineux-lè-Séguin (Mayenne), Francio.

PEDAGOGIA PANORAMO



Sub tiu titolo, I.P.R. intencas aperigi artikolserion pri la diversaj pedagogiaj skoloj kaj doktrinoj, kaj alvokas la legantojn al kora partopreno en tiu plano.

La iniciato apartenas al S-no A.D. ATANASOV el Sofio, kiu skribis al la Redakcio :

« ...Trovu inter niaj samideanoj didaktistoj kunlaborantojn, kiuj prezentu en apartaj artikoloj koncize, sed sisteme, la principajn ideojn de la grandaj pedagogoj de la epoko de KOMENSKI ĝis nun. Ekze unu skribos pri la edukprincipoj de Jan Amos KOMENSKI (COMMENIUS) en lia verkaro, alia pri la principoj de PESTALOZZI, iu rusa samideano pri la ideoj de HERBART, ktp... Se vi povos doni serion da tiaj artikoloj, la ĵarkolektoj de I.P.R. formos tre valoran « vade-mecum » por la pedagogoj. »

Nu ! Tiu programo jam elvokis plurajn favorajn reagojn kaj ni esperas ke multaj sin anoncos por kunlabori en ĝia efektivigo.

Jam Sinjoro la Supera Studa Konsilisto D-ro E.J. GOERLICH el Wien'o anoncis ŝatatan kunlaboron : li verkos pri la aŭstra pedagogo Otto WILLMANN kaj pri la germana pedagogo Friedrich Wilhelm FOERSTER.

Kiu anoncos sin plue ? Neniu valora pedagogia skolo restu neprezentita !

La redakcio starigos la definitivan planon de la serio post ricevo de la komentoj de ĉiuj partoprenantoj.

*
**

Se tiu entrepreno montriĝos sukcesa, ni povos poste entrepreni aliajn internaciajn enketojn. Ni povos ekzemple alpreni, tiam, la duan parton de la plano de S-ano A.D. Atanasov :

« Plue, se aliaj spertaj samideanoj prilaboros kaj prezentos sisteme, en ordo, alian serion de artikoloj pri jenaj temoj : rolo de la instruanto en la edukado — laŭ la kompreno de KOMENSKI, de PESTALOZZI, ktp..., la rolo de la rekompencoj, de la punoj, la diversaj ĝis nun rekomenditaj metodoj por aktivigi la lernantojn, la principoj de la laboredukado, respegulitaj en la verkoj de la nomitaj elstaraj pedagogoj, ktp, — certe el tio la gazeto gajnos ankoraŭ pli multe. »

*
**

Se tia entrepreno estas farebla, ni ja devas ĝin realigi ! Por igi nian revuon interesa en la koncerto de la ĉiunaciaj pedagogiaj revuoj ! Ankaŭ por honorigi nian movadon kaj nian lingvon !

I. P. R.

F. Cadenel

PRI LA LERNEJA DISCIPLINO

Laŭ la « Plena Vortaro » la disciplino estas la reguloj rekomendindaj por certigi la bonan funkciadon de la homaj kapabloj ; oni parolas pri intelekta, pri scienca disciplinoj.

Ĝi estas ankaŭ deviga regularo kaj lernita obeo necesaj por la bonordo de iu anaro ; en ĉi tiu senco oni povas aludi la militistan aŭ la monahan disciplinon.

Disciplini infanaron estas kutimigi ĝin al konformiĝo al reglamento. Oni disciplinas lernantojn kaj tiucele oni penas por ĝeni aŭ helpi iliajn instinktojn, impulsojn, inklinojn.

En la lernejoj, disciplino estas la necesega kondiĉo de efika edukado kaj per la korpa disciplino oni preparas la intelektan.

Ĉar edukado estas filozofio, socia sistemo, oni povas disigi disciplinon nek de ĝenerala koncepto pri la homo, kaj ties naturo, funkcio kaj destino, nek de kono de biologio, sociologio kaj psikologio.

Socio konstruas la sistemon pedagogian, do disciplinan, kiu pli bone taŭgas por ĝiaj bezonoj kaj genio, sistemon kiu pli ankoraŭ ol por ĝiaj materialaj bezonoj taŭgas por ĝiaj ideoj pri la homeco kaj ĝia volo por konservi ilin.

Oni povas aserti, ke disciplino estas nedisigebla de la moralo, ke daŭrigante en la estonteco la moralagadon de la nuna tempo ĝi pretigas la moralagadon de la futuro.

Same kiel edukado, disciplino estas agado de la socio sur la korpo kaj spirito de la individuoj por prepari ilin al socia vivo. Se iafoje la disciplino ne ĝenas la individuan naturon, ofte ĝi kontraŭas ĝin por la bono de la individuo, sed ankaŭ kaj precipe por la bono de la socio.

La greka urbo Sparto, militema civito, bezonis fortajn militistojn povantaj senplende rezisti la doloron ; ĝi ne kompatis la kriplulojn, la feblulojn kiujn ĝi mortigis ; ĝi trejnigis la gejunulojn por la defendo de la civito kaj la atako de la rivalaj gentoj per senĉesa ekzercado kaj senkompata hardado. Por la Spartanoj, la korpoj estis iloj, precipe iloj, kaj forĝante la korpojn, ili forĝis armilojn.

Ateno ankaŭ estis militema civito, sed ĝi ŝatis la belajn artaĵojn ; ĝi zorgis la korpojn, ĉar ĝi bezonis fortikajn civitanojn sed ankaŭ ĉar ĝi admiris belajn formojn. Probable ke sparta tribunalo estus kondamninta la malĉastulinon Frine ; sed areopago senkulpigis ŝin pro ŝia beleco.

Dum parto de Mezepoko, ofte, asketoj konsideris la korpon kiel pekofonton, kiel malpuran ujon de la spirito ; vole, ili ne zorgis ĝin, ĝin ne purigante kaj apenaŭ nutrante ; la korpo suferadis ri-

goraĵojn ; en la lernejoj oni batis la infanojn, ne por hardi, sed por puni ilian korpon kaj forigi de ĝi la demoniajn.

Nun, nia korpo estas konsiderata same kiel valorajo, preskaŭ diaĵo ; ĉiutage homoj, precipe virinoj, uzas variajn plibeligilojn. En la lernejoj la korpaj punoj ofte estas malpermesitaj kaj la administrantoj zorgas pri la bona higieno de la laborejoj.

Laŭ la epokoj kaj voloj de la sociestroj (pastroj, reĝoj, k.t.p.) la edukistoj penadis por akiri dresitajn subulojn ĉiam obeantaj senplende al la ricevitaj ordonoj, eĉ danĝeraj por la vivo - obeantaj sendiskute, eĉ senpripense, la aŭtoritaton de la Biblio aŭ de Aristotelo ; au, male, en demokratio la edukistoj penadis por ekzerci la kritikemon de la civitanoj, por ke ili plenumu sian devon, sciante la kialon de libere konsentita disciplino. La katehismo per demandoj kaj respondoj, kiun oni devas parkere reciti elvokas la unuan edukmanieron ; la praktito de la sinregado, kiun rekomendas la « novaj lernejoj » elvokas la duan edukmanieron.

Inter ĉi tiuj du konceptoj ekzistas ĉiugradaj disciplinoj, de obeopostulo, kiun la subuloj ne rajtas diskuti, ĝis la preskaŭa individuaŭtonomio, eĉ la kvazaŭa anarkio, pasante tra speco de dogmigo, kiun ni nomos la patrecismo (*). La patrecismo estas aristokrata politika sistemo, laŭ kiu la direktantoj konas pli bone ol la subuloj tion, kio taŭgas al ili ; ĝi trudas, sed pli volonte penas, por persvadi kaj ofte uzas sofismon ; ekzemple, ĝi asertas, ke la regatoj ne havas ĝenojn same kiel la estroj ; sufiĉas por ili, ke ili fidu la regantojn ; ĉu ni ne konas riĉulojn, kiuj certigas, ke la malriĉuloj estas bonŝancaj, ĉar ili ne vankas perdi sian monon ? ĉu la nova testamento ne instruas, ke kamelo pli facile trapasas kudriltruon ol riĉulo eniras paradizon ?

Plej ofte, ĉiuj sistemoj intermiksiĝas : nediskutebla leĝaro trudas konduton, propagando persvadas ; iafoje, en demokratio la estroj provas demonstri kaj donas pruvojn pri siaj asertoj.

Tiel estas en la lernejoj. La regularo, kiu ebligas efikan instruon variis laŭ la epokoj kaj landoj.

En Sparto, dum konkursoj, infanojn oni ĝismorte batis. Dum Mezepoko oni batis ilin por puni la demonon kaŝitan en ilia korpo, demonon responsan (*) pri iliaj stultaĵoj aŭ memormanko ; oni batis ilin, ankaŭ, ĉar ili naskiĝis makulitaj pro la « origina peko » ; eĉ nun en Britio oni batas, ĉar estas kutime de longa tempo.

Hodiaŭ, en la francaj publikaj lernejoj,

la disciplino estas adaptita je la aĝo, la temperamento, la responso kaj la kulpo-graveco de la lernantoj.

Ofte oni parolas pri la « Infano » ; sed « Infano » estas ento. Ekzistas nur infanoj. Kiom da infanoj, tiom da apartaj individuoj.

Ĉiu homo estas herede fiksita, tuj post la fekundigo de la ovolo ; la gepatraj genoj donas al la estonta homo ĝian temperamenton, sekve ĝian karakteron. Kaj ĉi tiu konstato eble malkuraĝigus la edukistojn ; sed homo posedas esencan econ : la eblecon parte ŝanĝigi per ekstera agado.

Ni ankaŭ rimarku, ke infaneto ne estas hometo. « Lia spiritostato diferencas de tiu de la plenkreskulo ne nur kvante, se dankau kvalite ; li ne nur estas pli malgranda, sed alia » (CLAPARDE) ; kaj prave, J.J. ROUSSEAU skribis, ke la infano « havas siajn proprajn vidkaj pens-manierojn ». Sed tamen, ni neniam forgesu, ke pro sia esenco, per la edukado li fariĝas homo.

Ne nur la temperamentoj kaj karakteroj diferencigas la infanojn, sed ankaŭ la farto. La nesufiĉa aŭ nehigiena nutrado, la alkohola heredo, la trinkado de alkoholo, la kaŝita evoluo de malsanoj, la kreskoperiodoj, la seksmaturiĝo influas la konduton de la infanoj kaj geadoltigantoj. Ofte pigreco devenas de laceco, de malbonfarto. Oni devas aludi la emocistatojn, kiuj generas kompleksojn de malplivaloro ĉe infanoj edukitaj en medioj pli aŭ malpli nenormalaj ; familioj en kiuj mankas la patro aŭ la patrino, en kiuj unu el la gepatroj reedziĝas post vidveco aŭ ekسدziĝo, nelegaj familioj, tro ofte, sendas al la lernejoj senekvilibratajn infanojn.

Do, en sama klasoĉambro ni trovas sociamajn kaj ribelantajn, obeemajn kaj ordonemajn, facile impresemajn, intelektajn kaj imagemajn, viglajn kaj dormemajn, bonkorajn, malicajn kaj perverajn lernantojn.

Ni devas ankaŭ kalkuli kun la momento de la jaro, la sezonoj, la festoperiodoj, la semajntago, la horo, kun la temperaturo kaj la aerumo de la ĉambrego, kun la varioj de la aerpremo, la alproksimiĝo de neĝofalo aŭ ekscita vento, pri la dimensioj de la ejoj (la novaj laŭreglamentaj francaj klasoĉambroj, bedaŭrinde, estas nesufiĉe vastaj por permesi manovrojn de la amasigitaj infanoj), kun la farbokoloro de la muroj kaj dekoracioj, kaj ni ne aludos la anoncon de filmoprojekcio aŭ alvenon de cirko, aŭ pason de aviadilo... aŭ muŝo.

La instruisto devas adapti sian disciplinsistemon laŭ ĉi tiuj faktoroj, kaj li ne forgesos, ke li mem influas la lernantojn per sia voĉtono atakema aŭ ironia, kuragiĝanta aŭ patreca, ke li mem reagis la influon de siaj propraj lernantoj.

Kaj li devas ankaŭ legustigi sian regularon laŭ la kulpoj de la infanoj. Ĉu

moviĝoj, ideinterŝanĝoj estas kulpoj aŭ naturbezonoj aŭ instrunecesajoj ? Laŭ la momento oni devas instigi aŭ toleri aŭ malpermesi ilin. — Infano ne aŭskultas lecionon, li enuas ; kiu, li aŭ la instruisto, estas kulpa ? Alia estas distrigema, forgesas sian krajonon, ne akordigas verbojn kun subjektoj, kaj rigardas la nubojn anstataŭ la nigran tabulon ; ĉu estas grave ? Eble li ne havas memoron aŭ inteligenton ; eble li estas impulsigema ; eble li ne sufiĉe aŭ ne higiene manĝas. Sed, tamen, se la instruisto ne reagis, eble neniam la lernanto penados por scii sian lecionon, neniam li provos por estri siajn impulsojn ; sankcio povas instigi lin longe pripensi, anstataŭ tuj kaj stulte respondi. Ĉu ne estas vere, ke timo antaŭ ĝendarmo estas prudentokomenco ? »

Plie, puno malsame efikas, laŭ tio kiel la klasestro kolere aŭ kviete agas ; ĉiam instruisto devas konservi serenajn sintendon ; ĉiam edukisto devas montri la bonan ekzemplon, nepran kondiĉon de efika aŭtoritato.

Fine la klasestro devas respekti la leĝon. La franca modela regularo de la unuagradaj publikaj lernejoj permesas nur la mallaŭdojn, la mallaŭdajn biletojn, la partan senigon de la paŭzo, la devigrestadon post la klastempo sub la gardo de la instruisto, la tempan eligon de la klaso dum tri tagoj pleje ; ĉi tiu lasta sankcio estas trudata de la instruitarkonsilo prezidata de la lernejestro. La sama regularo precizigas, ke la korpaj punoj estas malpermesataj. Oni rimarku, ke la punskribo hejme farotaj ne estas permesitaj.

Sed la regularo konigas nur la punojn ; ĝi ne aludas la rekompencojn, kiuj multe pli taŭge, efike, inhibas la malbonajn instinktojn kaj kreas bonajn kutimojn ; la rekompencoj estas stimulaĵoj, kiuj pli bone ol la punoj incitas la infanojn labori kaj respekti la regularon. Estas rekompencoj la laŭdoj, la donaco de bildoj, la poentoj. La punoj kuntiras la lernantojn, hipokritigas ilin ; la rekompencoj plifaciligas ilian evoluon ĝojigante ilin.

Ofte la deziro al la laŭdoj kreas konkurmon, per kiu la infanoj pliintensigas sian penadon ; konkuremo estas transformiĝo de la batalinstinkto ; lerta edukisto devas uzi ĝin, singardeme sed ofte.

Certe estus preferinde, ke la infanoj laborus nur pro laboramo ; sed, ĉu ni povas akirigi al la infanoj, kvalitojn malofte trovatajn ĉe la plenkreskuloj ? La knaboj laboras por eviti punon, kaj pli volonte por gajni premiojn ; iom post iom la leĝotransmeto efikos : same kiel la avarulo unue ŝparas monon pro la plezuro, kiun ĝi povas havigi al li, kaj poste nur pro la amo al la mono, same la infanoj, iam laboros nur pro la sukcesplezuro kaj la kontenteco de laborplenumo ; sed ni devas konfesi, ke la plena-

guloj laboras precipe por gajni sian vivrimedon kaj ni ne miru, ĉar la infanoj tute same laboras por sukcesi ekzamenojn aŭ konkursojn, kiuj permesos al ili pli facile akiri vivrimedojn.

La rekompencoj estas tre preferindaj ol la punoj, ne nur ĉar ili ĝoje stimulas la lernantaron, donas al ĝi la deziron klopodi por sukcesi, sed ankaŭ ĉar ili ĝin atentigas pri la bonaj agadoj, la bonaj ekzemploj. Male per punoj, la edukisto montras precipe la malbonaĵojn.

Do, racia edukado uzas malofte la punon, sed ofte la rekompencojn; prefere ol la ŝtonigantajn sankciojn ĝi elektas la vigilantajn.

Ofte la klasestro donos kolektivajn rekompencojn, sed neniam opajn punojn; estas sendaŭgore nerekte laŭdi senpripensuleton; estas maljuste puni senpekan infanon; per la kolektivaj punoj la edukisto konfesas sian senpovecon, perdadas sian aŭtoritaton, naskas ribelon; per la opaj rekompencoj li streĉas la volon, vigligas la entuziasmon.

Kompreneble la sankcioj devas esti nuancigitaj. Ofte, ne severa admono, milda mallaŭdo, eĉ rigardo sufiĉas por puneti infanojn pekantajn senintence; sed estas geknaboj, kiujn oni devas malmilde, eĉ minace alparoli. Oni devas eviti oftan laŭdon al la orgojuloj, sed laŭdegi la timemulojn, eĉ kiam ili nur duone sukcesas. La sankciojn oni devas dozi laŭ la temperamento, la karaktero, la eblecoj de la lernantoj, ne laŭ nehumana ununura tarifo, ĉar ili devas malofte bremsi, sed ofte eksciti.

Gravas, ke la edukisto senkolere punas; sed li devas varme, eĉ emocie gratuli, ĉar li devas kortuŝi la junulojn.

Sed sankcioj estas nur la ekstera parto de la disciplino. La kompetenta instruisto malofte bezonas punojn, eĉ rekompencojn. Per sia instruado zorgege pretigita, meditita, asimilita, li kaptas la atenton de la lernantaro. Li elektas temojn adaptitajn al ĝi; kaj post racia ordigo eksponas ilin klare kaj detale, uzante simplan vortprovizon, elparolante sufiĉe laŭte, malrapide, nete; li proponas ekzercojn, variajn, nek tro facilajn, nek tro malfacilajn. Li konkretigas sian instruadon, vorte aŭ bilde ilustras ĝin. Per demandoj li vigligas la geknabojn, ofte postulas opajn respondojn, jen buŝe, jen skribe kaj tuj kontrolatajn (procedo de la Martinière per la ardezaĵoj). Infanoj, kiuj laboras ne kulpas; bruo dum ordigita laboro ne estas mallaŭdinda: ĝi estas la promesanta zumado de la abelaro. Vigla, adaptita instruado tre faciligas la disciplinon.

Alia rimedo estas la kunlaborado de la instruisto kun la infanoj. Kompreneble, ĝi estas direktita de la klasestro; anstataŭ resti sur la katedro same kiel pastro antaŭ la altaro, li iras, laŭlonge kaj laŭlarĝe en la ĉambro, al la lernantoj, same kiel patro iras al siaj infanoj; kaj li

petas helpon por la lernejlaboro, materialon, dokumentojn; pluraj semajnoj antaŭe, li konigas al la geknaboj la taskotemojn, la leciontitolojn, kaj la infanoj havas tempon por pripensi kaj prepari la laboron. Ifoje, la lernantaro dividiĝas en plurajn aretojn; al ĉiu el ili la klasestro distribuas ĝian roleon, kaj ĉiu infangrupo pretigas laborparton, esploras la temon ricevitajn aŭ, ifoje elektitan. Plie, ĉiutage, ofte, en la klasoĉambro, la lernantoj provas helpi la instruiston, responsante pri materialaj laboretoj. Per ĉi tiu faro, ili pli interesiĝas pri la lernejlaboro, pli atentigas la lecionojn, do pli bone komprenas kaj memoras.

Nenion neglektas la kompetenta instruisto por akiri kaj firmigi stimulantajn disciplinon. Li pensas pri la inteligento kaj esplikas, demonstras; li pensas pri la sentokapablo kaj emocias, kortuŝas; li pensas pri la imago, fantazio kaj ektuziasmigas; li pensas pri la karaktero, provas modifi ĝin kaj kanalizas la korpajn kaj psikajn fortojn.

Li uzas ĉiujn memorformojn, vidajn, aŭdajn, muskolajn, ĉar neniam li forgesas, kiom diversaj estas la anoj de lia klaso. Varia instruado, neniam infanon forlasas. Pro tio la klasestro uzos ĉiujn esprimilojn: ne nur la parolon aŭ la skribon, sed ankaŭ la desegnon, la modladon, la manlaboron, sed ankaŭ la mimikon kaj la dancon.

Ĉu necesas akcenti, ke ili neglektas nek la korpajn ekzercojn, nek la kanton kaj muzikon, nek la « silentminuton », kiu kvietigas la moviĝemulojn?

Jes ja, necesas kaj mi insistas; ĉar klasestroj, kiuj opiniis utili la kandidatojn, instruante nur la konkursaĵojn; ili plenigas la infancerbojn per problemoj, diktaĵoj, resumoj kaj ignoras la aliajn instruadojn. Ili estas spiritblindaj kaj danĝeraj uloj, ĉar ne nur ili enuigas kaj brutigas la infanojn, sed ili misformas, ili mutilas ilin; ili ne konas sian metion aŭ ne posedas la kvalitojn, kiujn ĝi postulas kaj oni povas aserti, ke ili ne superregas ĝin.

Lerneja disciplino, do ne estas nur deviga regularo, lernita obeo. Ĝi, ja, estas ankaŭ rimedaro, metodo por lerte evoluigi ĉiujn eblecojn, kapablojn korpajn kaj psikajn de la infanoj, estontaj homoj, kaj prepari en ili la necesajn kvalitojn, por ilia feliĉo en la sino de la socioj en kiuj ili vivos.

Ĉar ĝi estas kunligita al la instruado kaj nedisigebla de la edukado, ankaŭ disciplinsistemo estas filozofio, kiu sintezas la sciencojn pri la deveno, la formado, la estonteco kaj la iĝeco de la homoj.

F. CADENEL,
Marseille.

GLOSOJ. — *Patrecismo*: sinteno, laŭ kiu oni kondutas *patrece* al siaj subuloj (oficistoj, laboristoj, ktp..., aŭ infanoj, lernantoj, ktp...) (F. *paternalisme*).

Responso aŭ *respondeca* (P.V. 4-a eld.)

Marjorie Boulton

Lernejoj Uniformoj

Geknaboj, kiuj dece estimas sin kaj vivas en demokrata socio, kie ĉiuj havas kelkajn homrajtojn, kutime kondutas almenaŭ tolereble. Inter la celoj de lerneja uniformo, helpo al memestimo nepre troviĝas.

La ĉefaj argumentoj, kiujn oni publike uzas por pravigi tiun ĉi kutimon, estas ja tiaj, kiajn liberamaj edukistoj povas forte aprobi. Se ĉiuj geknaboj portas uniformon, la vestaj malsimilaĵoj inter infanoj el riĉaj kaj malriĉaj hejmoj estos minimumaj; tio ĉi helpas al demokrata sinteno kaj evitos multajn humiliĝojn al malriĉuletoj. Bone ja; ĉar ofta humiligo estas eble la plej danĝera kaŭzo de kontraŭsociemo kaj neŭrozemo. Fakte, vestaj malsimilaĵoj restos; malriĉaj geknaboj malpli ofte ricevos novajn vestaĵojn; kaj, (kiel mi scias per amara sperto), kiam oni transvestas sin por gimnastiki k.t.p., la lernejan(in)o (*) kies subvestaĵoj estas malbonkvalitaj aŭ groteske eksmodaj ankoraŭ humiliĝas! Sed la similigaj uniformoj almenaŭ iom helpas.

Alia inda celo estas: starigi fieron pri la lernejo kaj komunuma spirito. Nu, ĉiu lerneja, loka, eĉ landa patriotismo devus cedi antaŭ la idealo de la tuthoma gefrataro; sed ĉar, por nematuraj homoj, kolektiva spirito en malgranda komunumo estas la unua paŝo for el besta egoismo, tiu ĉi lerneja fiero povas esti morale valoro. Kaj ne ĉiuj sentas, ke iu ajn kolektivemo povas iomete mildigi tiun esencan solecon kiu estas, ŝajne, parto de la homa situacio surtera.

La fiero pri la lernejo povas ja emfazi senton de klasa supereco; sed pri tio oni povas troigi; la uniformo estas simptomo pli ol kaŭzo. Tiu ĉi klaskonscio efikas dudirekte: multaj liceanoj parolas malestime pri senuniformaj geknaboj, sed, kiam mi portis lernejan uniformon, stratbuboj plurfoje ĉasis min (jam etan socialistinon!), kriaĉante riproĉojn kies motivo estis videble klasa.

Lerneja uniformo havas diversajn realajn praktikajn utilojn. Ĝi ĉesigas argumentojn en trajnoj, aŭtobusoj, kinetoj k.t.p. kie la prezoj por lernejoj estas malpli altaj. Mi povas kredi, ke lernejo eble hezitus fari ion malmonan por ne maldignigi sian uniformon. Kiam lernejoj ekskursas, la instruisto povas pli facile trovi, arigi kaj kalkuli se ili portas uniformon.

Laste, oni povus eble ŝati lernejajn uniformojn pro estetikaj motivoj. Tia si-

mileco, en granda halo aŭ eĉ en klasĉambro, ja aspektas iom plaĉa kaj kvazaŭ simetria. Oni evitas kriaĉajn kolormalharmoniojn kaj strangajn malbongustaĵojn.

Nu, jen kelkaj avantaĝoj de lernejaj uniformoj. La ĉefa malavantaĝo laŭ la gepatra vidpunkto estas la kosto, ofte draste plialfingita per loka akaparo. Sed ekonomiaj problemoj estas kutime solveblaj, se nur oni vere volas solvi ilin; la embarasitaj gepatroj brue protestu kaj kree sugestoj!

Laŭ la geknaba vidpunkto, uniformoj havas unu grandan malavantaĝon, kiun oni sentas ĉefe post la dektria aŭ dek-kvara jaro: ĝi ĉenas ilin al infaneco kiam ili jam maturiĝas.

Kiam maturuloj videble deziras, ke gejunuloj restu « infanoj » kiel eble plej longe, mi, (studinte Freudon, kvankam ne ortodoksa freŭdanino), ĉiam suspektas pri tiuj seksaj envioj kaj ĵaluzoj kiujn oni vidas ankaŭ ĉe la simioj. La plej feliĉa infaneco estas nur preparado al la vivo; kaj infaneco estas ofte, eble plej ofte, la plej malfeliĉa vivoparto; kial, kial, je Minervo kaj Afrodito, resti infano dum unu plua sekundo se oni povas eskapi?

Sed junuloj eĉ deknaujaraj ofte devas porti ĉapojn kiuj indikas al ĉiuj ke ili estas nur lernejoj; kaj por junulinoj la celo de lerneja uniformo ofte estas, ŝajne, kiel eble plej multe saboti la virinecon. Almenaŭ en Britujo, jam virinigiĝintaj knabinoj ofte devas porti nekredible malbelan specon de tuniko. Oni nomas ĝin « *gym-slip* » — « gimnastika vestaĵo » ĉar antaŭ multaj jaroj knabinoj portis tiun senkonturan vestaĵon por gimnastiki. Nun ili transvestas sin por gimnastiki, sed la tuniko ankoraŭ — travestias ilin! La plimulto de britaj liceaninoj devas porti uniformajn ĉapelojn tre eksmodajn, kiuj malbeligas preskaŭ ĉiun normalan knabinan vizagon. Oni ankaŭ ofte malpermesas al liceaninoj porti juvelojn kaj ŝminki sin; tiel oni kvazaŭ montras al studemaj, inteligentaj knabinoj, ke normala nuntempa virineco estas privilegio de stultulinoj. Mi dubas ĉu la psikaj rezultoj, ĉu inter profesie-maj virinoj, ĉu en la familia vivo, estas tre dezirindaj.

Tiel, precipe por knabinoj, sed ankaŭ

(Fino sur paĝo 79)

Jean Charvet

GRAMATIKAJ DIFINOJ

Estas ja kverelo pri la difinoj; kaj ĝi estas tiel malnova kiel la mondo, aŭ pli ĝuste ĝi ekzistas de kiam oni instruas gramatikon. Iam — sed ĉu tiu tempo jam vere forpasis? — oni konceptis instruadon nur kiel dogmegan kaj teorian. Oni enverŝis la sciencan en la kapon de la lernantoj per formuloj. Estis la tempo kiam oni instruis kemion sen aparatoj, sen kemiaĵoj kaj sen eksperimentoj. En tiu tempo, kiun ni konis, gramatika lernolibro konsistis nur el difinaro kun sortimento da ekzemploj. La lernanto devis nur lerni kaj parkeri.

Gramatiko kiel observoscienca. — Poste okazis reago. Oni ekkonsciis, ke gramatiko same kiel kemio estas observoscienca, ke, en la sama tempo kiam en niaj liceoj kaj kolegioj laboratorioj estis provizitaj, kiam en la plej modesta vilaĝa lernejo aperadis sur la instruista katedro aŭ en angulo de la klasĉambro, sur tablo tro ofte polvokovrita, rudimentaj sciencaj aparatoj, eldonigis gramatikaj lernolibroj, kie apud bildoj aŭ desegnoj ĝojgantaj la okulojn, kiujn oni instigis malfermi, ĉiu leciono estis de nun antaŭita de teksto destinita provizi ĝian materialon. Ne plu temis instrui per formuloj, sed ja per observo de la gramatikaj faktoj. Ve! ŝajnas, ke jam venis la tempo de la seniluziigoj. Oni ĉiuflanke proklamas la fiaskon de la observa metodo kaj oni facilpaŝe revenas al la antaŭaj metodoj. Oni ne demandas sin, ĉu la eksperimenton oni efektive provis kaj ĉu, malgraŭ la oficialaj instrukcioj, vere ekzistas klasoj, kie oni provis instrui gramatikon per tekstoj. Oni deklaras, ke observado ne estas en atingopovo de la infanoj kaj ke oni denove lernigu al ili difinojn: tiam, oni diras, ili almenaŭ ion scios.

Kiel koncepti difinojn. — Ni do enmiksiĝu en la kverelon kaj partiigu. Ĝismortan malamon ni ne havas kontraŭ la difinoj, per kio ni elmontras al la lernantoj, ke ni scias pli multe ol ili, sed stariĝas du demandoj. Por kio servu la gramatikaj difinoj? Sekve kiel ilin koncepti? Ĉar laŭ nia opinio difino estas rimedo, ne celo. La instruado de la gramatiko celas konduki la infanon konsciiĝi kiel li parolas, t.e. kiel li esprimas sian penson por ĝin komuniki. Se oni lernigas al li nur difinojn kiel ajn precizajn kaj kompletajn, li troviĝos kiel homo lerninta botanikon en libroj kiu, promenante iun belan tagon sur la kamparo, rekonas nek vegetaĵon nek floran, aŭ kiu, en la arbaro ne distingas fagon disde

kverko, kaj rekonas abion nur per tio, ke li iam vidis tian en kristnaska elmontraĵo. Lernigi nur difinojn al la lernantoj estas instrui senenhavajn formulojn, anstataŭigi per abstrakta kaj teoria scienco la ekkonon de la konkretaĵoj.

Sed, oni diras, lingvo estas mekanismo kun siaj radaroj, el kiuj ĉiu ludas propran rolon. En profesia kurso al metilernanto oni instruas teknologion; oni klarigas al li el kio konsistas la maĉino, kiun li devos konduki kaj kiel ĝi funkcias; oni ĝin malmuntas, oni emnavigas al li ĉiun ĝian parton, ĝin nomante kaj klarigante ĝian utilecon kaj rolon. Ĉu gramatiko ne estas la teknologio de la lingvo? Se oni celas, ke la infano komprenu la mekanismon de la lingvo, ĉu ne necesas instrui lin pri ĝiaj elementoj, t.e. la vortoj, al kio ili utilas, do ilian funkcion? Por ilin konigi al li ĉu ne necesas difini kaj tiujn vortojn kaj tiujn funkciojn?

Tiu komparaĵo nur parte ĝustas. Unue la metilernanto nenion konas pri la maĉino, kies mekanismon oni klarigas al li; li ne konas ne nur ĝian funkciadon, sed ankaŭ ne ĝian manovron. Tute male la infano, se li scias nenion pri la lingvo, kiun li ekstudas, tamen li ĝin jam praktikas, ĝin parolante. Aliflanke ĉu oni kredu, ke estas teknologio, kiu lernigas al la lernanto lian metion? Se li ne praktikas ĝin en la laborejo li sendube scios la nomon kaj la utilon de la iloj, kiujn li uzas, sed li neniam scios, kiel ilin manovri. Same pri gramatiko. Evidentas, ke la infano por koncepti la lingvan mekanismon bezonas koni la parolelementojn kaj ties funkciojn. Sed ĉu estas scii, ĉu la difinoj, kiujn oni kapabladi al li, sufiĉas por ke li rekonu ilin. Diru al li, ke substantivo estas vorto, kiu nomas estulon aŭ estaĵon; por nomi hundon aŭ tablon, li jam scias, ke oni diru « hundo, tablo » kaj tion li ja diris, vi nur lernigis al li, ke tiuj vortoj estas substantivoj. Sed se en teksto li renkontas abstraktan nomon, kiun li ne konas, ĉu la liverita difino sufiĉas, por ke li rekonu tiun abstraktan nomon? Klarigu al li kio estas objekta komplemento, donu al li la plej eble ĝustan difinon; poste vidu, ĉu li povos rekonu objektan komplementon en frazo. Cio, kion li scios estos parkeri la difinon kaj la ekzemplon, kiujn vi jam donis al li. Tie haltos lia scienco (1). Ĉu tio estas la celo de la instruado de gramatiko?

Tamen ne kredu, ke la difinoj estas nur balasto kaj ke oni ilin foratentu. Gramatiko estas scienco pri lingvo, kaj ne estas scienco sen klasifiko, ĉar scien-

co estas ĝeneralaĵo. Klasigi faktojn estas vicigi ilin laŭ kategorioj, kiujn oni nomas per specialaj terminoj. Al kio respondus tiuj terminoj, se oni ne difinus ilin? t.e. se oni ne resumus en formulon la komunajn karakterojn, kiujn oni rekonis en la faktoj arigitaj sub la sama termino? Sed tio taŭge indikas al ni tion, kio estu gramatikaj difinoj. Tie ĉi ni ne staras en la matematika kampo, kie la difino antaŭtempas la faktojn kaj kie ĝi estras ilin. En la naturo estas neverŝajne, ke ekzistas perfekta cirklo, kaj cirklo estas koncepto de la spirito. Tial post starigo de la difino de la cirklo, ne ekzistas figuro, kiu estas cirklo, se ĝi ne perfekte respondas al tiu difino. Ĉi tie ni estas en la kampo de la observosciencoj; ekzistas substantivoj, objektaĵoj, komentoj, kies difino ne antaŭtempas ilin; sed estas la rezulto de observado. Ĉi nur formuligas ilin, resumante la konstatojn, kiujn oni finatingis.

Scienco kaj instruado de gramatiko. — De nun ni klare distingu la gramatikan sciencan kaj la gramatikan instruadon. La gramatika scienco, same kiel ĉiuj sciencoj ne konceptiĝas sen la plej eble kompletaj, la plej eble adekvataj difinoj, kiuj estu la finatingoj, t.e. kiuj signu la plej malproksiman punkton, kien kondukis la observado kaj okaze la eksperimentado. Sed la infano al kiu oni instruas gramatikon, paŝon post paŝo, iel reiras la longan vojon jam antaŭ li iritan de la gramatikistoj. Gvidate de sia instruisto, ĉe ĉiu leciono, ili iras iom pli antaŭen en la labirinto de la faktoj. Nur iom post iom li rekonas inter tiuj faktoj la komunajn karakterojn, kiuj permesas al li ilin klasigi. Tion li povas nur laŭgrade en la mezuro kiel lia observopovo etendiĝas kaj lia prijuĝo akriĝas. Proponu al li ekde la komenco la difinojn, kiujn la gramatikistoj finatingis. Kian signifon ili havas por li, ĉar ili konsekvencas el la de li jam faritaj observoj? ĉar ili ne posttempas la faktojn.

Jen en lernolibro por la dua klaso difino de tio, kion oni nomas « predikativo »; tiun difinon oni celis, ke ĝi estu kiel eble plej ĝenerala kaj ke ĝi taŭgu same bone por la subjekta kaj la objekta predikativo. Kion ĝi povas signifi por lernantoj, kiuj ankoraŭ ne aŭdis pri la objekta komplemento? Al kio ĝi respondas, se ĝi antaŭas la observadon?

Ni precizigu nian penson. Unue la difino, anstataŭ antaŭ la lecionon, devas ĝin sekvi. La leciono konsistas en la observado kaj interpretado de la faktoj; la difino estas nur resumo, envortigo de la rezultoj de la observado. Estas kvazaŭ bilanco, kiun fari oni povas nur en la fino de la financa jaro. Konsekvence se evidentas, ke oni ne povas elstudi gramatikajn en la daŭro de unu leciono eĉ ofte de pluraj sinsekvaj lecio-

I.P.R. ne aperos en Aŭgusto kaj Septembro. Venonta numero en Oktobro.

noj, kaj ke ne estas eble en la dua klaso pluiri tiel malproksime, kiel en la postaj klasoj, se oni povas en la dua klaso paroli pri la subjekta predikativo dum estus antaŭtempe paroli pri la objekta predikativo, se unuvorte devas esti progresado en la instruado, devas esti ankaŭ progresado en la difino, por ke tiu difino posttempa je la faktoj neniam ilin antiĉipu.

(El « *L'Ecole Libératrice* »).

8 Feb. 57

Tradukis F. BARONNET.

kun la afabla permeso de la redakcio kaj de la aŭtoro.

(1) *Noto de la Trad.* — Niaj kursgvidantoj certe tion spertis en la instruado de Esperanto. La difino de akuzativo estas simpla afero facile parkerebla; sed ĉu pro tio ĝia instruado pruviĝis same facila?

(*Fino de la paĝo 77*)

iom por knaboj, tiuj lernejoj uniformoj, kiuj ja povas helpi al la sinestimo, povas malhelpi kaj povas esti subpremilo en tiu tragika klasbatalo inter la junaj kaj la maljunaj — tiu konflikto en kiu « paca kunezistado » devus esti nia celo.

Kiel kutime, mi tute ne volas proponi solvojn; mi ne rajtus; mi celas nur pensigi. Lernejoj uniformoj ne estas kiel soldataj uniformoj; ili ne havas neprajn asociojn kun malfeliĉo, malbono kaj malrespekto al homaj personecoj; sed lernejestr(in)oj eble devus ofte reipensii la aferon laŭ la kutimoj kaj kriterioj de la nuntempo.


Marjorie Boulton.

Lernejan(in)o. Mi konfesas, ke mi ne scias laŭlegi tiun algebran formulon. Ĝi taŭgas, laŭ mi, nur por aliĝiloj, k.s., kie la uzanto ja devas forstrekii unu el la alternativoj. Tamen, ideo, la formulo estas pli ol komprenebla: ĝi estas klara; nur ne prononcebla. Tia ekzemplo tre pravigas la proponon de S-ro HAMMING, kiu okaze de tre scienca artikolo en *Scienca Revuo* 8/2, p. 47, proponas uzon de la singlaro de la ambaŭseksaj vortoj. Do: *gelerneĵano*. — Red.

NI KONDOLAS

al nia samideano Krestanof, kiu estis nia provizora bulgara peranto, kies patrino kaj inspirantino Rada H. Krestanova mortis 94-jara en Sofio.

NI LERNU PER BILDOJ




SUR LA MARBORDO

- | | |
|----------------|---------------|
| 1. la ondoj | 6. la haveno |
| 2. la strando | 7. la lumturo |
| 3. la banantoj | 8. la digo |
| 4. la ŝipo | 9. la dunoj |
| 5. la suno | 10. la nuboj |

1. Homoj sin banas en la maro : ili estas banantoj.
2. La ondoj sin jetas sur la digon.
3. Geknaboj ludas sur la strando per sablo.
4. La ŝipo eniras la havenon (iras en la havenon).
5. La ondoj estas tiel altaj, kiel la banantoj.
6. La geknaboj ne banas sin ĉar la ondoj estas tro altaj.
7. La digo estas farita el ŝtonoj.
8. La maro ne estas tiel blua, kiel la ĉielo.

DEMANDOJ


Per kio la knaboj ludas ? Ili ludas per sablo.
 Kial la geknaboj ne banas sin ? ĉar la ondoj estas tro altaj.
 El kio estas farita la digo ? Ĝi estas farita el ŝtonoj.
 Kion la ŝipo eniras ? Ĝi eniras la havenon.




Cu la ondoj estas altaj ?
 El kio estas farita la digo ?
 Sur kion la ondoj frakasigas ?
 Kial la ondoj estas altaj ?



Kion faras la banantoj ?
 En kio ili sin banas ?
 El kio konsistas la strando ?
 Per kio ludas la geknaboj ?



Kio estas en la haveno ?
 Kio eniras la havenon ?
 Kio staras sur la digo ?
 Cu estas ondoj en la haveno ?



Kio estas en la blua ĉielo ?
 Cu estas multaj nuboj ?
 Cu la maro estas tiel blua, kiel la ĉielo ?
 Cu frostas ? Kial ?

**BONVOLE NOTU LA NOVAN
 ADRESON** de via redaktoro : D-ro
 A. ALBAULT, 8, avenue Et. Billières,
 Toulouse.

Bedaŭrinde nur en Oktobro povos aperi diversaj informoj tro malfrue alvenintaj.

SERCATA : I.P.R. : kompleta jaro 56 kaj n-ro 2 de 57. Rekompenco laŭ interkonsento. S-ro Eduard V. Tvarozek, Hviezdoslavova ul. 2/III, Martin, Ĉeĥoslovakio.

Atanas D. Atanasov — Ada

LERNU KAJ INSTRUU



Naŭa Leciono

Leciono de Esperanto

Feliĉe ni alvenis en la kursejon ĝustatempe — sen malfruiĝo.

Unu minuton post nia alveno eniris la ĉambro ankaŭ la instruisto. Mi sciigis al li pri la ĉeesto de miaj du amikoj kiel gastoj. Li volonte konsentis, ke ili restu kaj aŭskultu la lecionon.

— Nun, gesinjoroj — li diris — ni komencu nian laboron. Unue ni ripetu koncize la materialon, kiun ni lernis en la lasta leciono. Kiam ni havis la lastan lecionon? S-ro Aleksandro, diru, mi petas.

Aleksandrov. — La lastan lecionon ni havis vendrede la okan de marto.

La instruisto. — Kaj kion ni lernis tiam?

Aleksandrov. — Ni lernis pri la sufikso EM kaj UL.

La instruisto. — Ĉu la tutan horon ni okupis nin nur pri la du sufiksoj? Respondu vi, F-ino Spasova.

Spasova. — Ni lernis ankaŭ pri la uzo de volitivo en la kazoj, kiam oni ne povas uzi infinitivon.

La instruisto. — Bone. S-ro Stoev, donu ekzemplon pri la sufikso EM.

Stoev. — « Babilema ».

La instruisto. — Kaj mi petas F-inon Nikolova doni ekzemplon pri la sufikso UL.

Nikolova. — « Belulo ».

Petrov. — « Babilemulo ».

La instruisto. — Jen trafa ekzemplo, kiu entenas ambaŭ sufiksojn. Sed mi preferus, ke alian fojon S-ro Petrov ne aŭdigu sin antaŭ ol mi donas al li demandon.

Petrov. — Mi kulpas. Mi petas pardonon...

La instruisto. — Hodiaŭ ni legos la artikoleton « Pri la egiptaj piramidoj ». Malfermu la librojn je la paĝo 58. Kiu deziras legi? (Ĉiuj levas la manojn). Mi vidas, ke ĉiuj estas legemaj, sed ne estas eble, ke ĉiuj legos. Hodiaŭ mi preferas ke Lazarov legu.

Lazarov legas kelkajn minutojn. La artikoleto estas mallonga. La ceteraj kursanoj sekvas la tekston en siaj libroj.

Post tio la instruisto donis kelkajn demandojn kaj klarigis novan regulon de la gramatiko. Ĉiu el ni devis verki ekzemplojn kun apliko de la nova regulo. Poste, laŭ invito de la instruisto, la kursanino Kostova rakontis libere (per propraj vortoj) la enhavon de la artikoleto. Ŝi povis senerare ripeti la dimensiojn de la piramido de la egipta faraono Heopso: alta 140 metrojn, longa kaj larĝa ĉe la fundamento 232 metrojn; kaj tiun piramidon oni konstruis 3.700 jarojn antaŭ Kristo!

Fine la instruisto turnis sin al ni per la jenaj vortoj:

— Gesinjoroj, jam du monatojn vi lernas la internacian lingvon. Ĉu vi ne sentas, ke vi havas jam sufiĉe da konoj, por eniri en rilatojn kun la mondo? Jen mi disdonas al vi adresojn de korespondemaj esperantistoj el diversaj landoj. Mi deziras, ke ĉiu el vi korespondu kaj trovu amikojn en la vasta mondo.

La instruisto donis ankoraŭ kelkajn gvidkonsilojn pri la verko de leteroj kaj disdonis adresojn. Mi ricevis tri adresojn de esperantistoj el tri landoj.

Venis la fino de la leciono. Kiel kutime ĝi daŭris 45 minutojn.

Dum la kursanoj disiris, mi amiko Marko proksimiĝis al la instruisto kaj

donis al li kelkajn demandojn. Laŭ la vizaĝo de Marko mi komprenis kiom impresis lin tio, kion li vidis kaj aŭdis dum tiu ĉi horo.

Ni eliras sur la straton. Nikolao estas ekster si pro entuziasmo. Marko marŝas silente kaj meditas.

Proverbo. — Pro guto post guto disfalas granito.

UZO DE AKUZATIVO KIEL ADVERBA ESPRIMO (por esprimi cirkonstancon, tempon, mezuron).

Tutan horon (dum tuta horo) mi legis la ĵurnalon.

Kiun tagon (en kiu tago) vi vizitos nin ?

Iun tagon (en iu tago) li renkontis sian onklon sur la strato.

La dekan de junio (en la deka tago de junio) li venos.

Kilogramo da pomoj kostas 150 frankojn.

La katedrala preĝejo en nia urbo estas alta kvindek metrojn.

La vojo inter la du vilaĝoj estas longa dekdu kilometrojn ; oni devas marŝi tri horojn, por iri de la unu en la aliajn.

EN ESPERANTO LA AKUZATIVO SERVAS :

- a) por montri la *objekton de ago* (rekta komplemento) — vidu lecionon 1.
- b) por esprimi la *celon de movo* (konkretan aŭ abstraktan) — vidu lecionon 7.
- c) por formi *mallongajn esprimojn kun adverbeca senco*, kiaj estas la supraj ekzemploj.

— *Noto.* — Nun la instruanto povas fari pli detalan *rekapitalucian trarigardon pri la uzo de la akuzativo, donante plurajn ekzercojn pri ĝiaj funkcioj kiel rekta komplemento ktp.*

PREFIKSO

DIS montras, ke la ago estas farata al diversaj flankoj, en plurajn direktojn :

disĵeti — ĵeti al diversaj flankoj, en diversajn direktojn ; disdoni — doni al multaj homoj, kiuj estas ĉirkaŭe ; dissendi la gazeton ; dissemi ; ni disiris (ni iris en diversajn direktojn).

NOTINDAJ VORTUZOJ KAJ ESPRIMOJ

Vi haval sufiĉe da konojn = vi havas sufiĉajn konojn.

Mi veturas al Parizo. Mi veturas en Parizon. Mi veturas Parizon. (En la lasta propozicio la akuzativo esprimas sufiĉe la direkton kaj oni povas ne uzi prepozicion).

Eniri la ĉambron = eniri en la ĉambron.

Enhavi = havi en si. La libro enhavas rakontojn kaj versaĵojn. Enhavo de libro : tabelo de enhavo.

Enteni — teni en si, havi en si. La akvo entenas hidrogenon.

Aŭdigi sin : Li aŭdigas sin = li faras, ke oni aŭdu lin.

EKZERCOJ

1. Kompletigu :

Tut... tag... ni pasigis en la vilaĝo.

Li atendis antaŭ sia pordo tri hor...

Unu jar... li loĝis en Parizo.

Mi ne povas viziti lin ĉi... tag..

Nur unu foj... li legis tiun libron kaj ĉion li memoras

Ali... foj... ne manĝu tian panon !

Ki... tag... vi estos libera ?

La sep... de oktobro ni povos jam forveturi.

La libro kostas nur ducent frank...

2. En la sekvantaj aldonu al la verboj la sufikson DIS kaj uzu, kie necese, la substantivojn en pluralo.

Li sendis libron al sia amiko. (Li dissendis librojn al siaj amikoj).

Georgo perdis sian kajeron.

La instruisto metis la kajeron sur la benkon.

Mia onklo portis pomojn al la parencoj.

La laboristo batis la ŝtonon per granda martelo. Pecoj de la ŝtono saltis ĉirkaŭe.

Ni ĵetos tiujn ĉi paperojn.

La vento blovas liajn harojn.

DISTRA PAGO

KONKURSO N° 7

Gajnintoj : F-ino Caubel, F-ino Deygas, S-ro B. Fischer, S-ino Le Goff, S-ino Lemoine, Ges-roj Lenel, S-ro F. Micoud, F-ino Gudula Thénés gajnis 2 poentojn.

D-ro Jaromir Jermar gajnis 1 poenton.

Post tiu konkurso, S-ino Le Goff gajnis 345-frankan libron ; kaj S-ino Gulula Thénée gajnis 315-frankan libron.

Ni gratulas ĉiujn.

KONKURSO N° 8

Jen la solvo :

Horizontale : 1. Kvodlibeto ; 2. Brodas ; 3. Ag, akor, ke ; 4. Tek, al, sur ; 5. Enea, okula ; 6. Rigli, olec ; 7. Nal, mi, kri ; 8. Aj, suko, oa ; 9. Tenilo ; 10. Apokalipso.

Vertikale : 1. Kvaternara ; 2. Geniaj ; 3. Ob, kugl, to ; 4. Dra, al, sek ; 5. loka, imuna ; 6. Idolo, ikil, 7. Bar, ko, oli ; 8. Es, sulk, op ; 9. Kulero ; 10. Operaciato.

Gajnintoj : S-ro Bourry, F-ino Caubel, F-ino Deygas, S-ro Génuit, Ges-roj Lanz, Ges-roj Lenel, F-ino Robin, F-ino Texier gajnis 2 poentojn. S-ino Lavallée gajnis 1 poenton ; F-ino Hanson gajnis neniun poenton.

Post tiu konkurso S-ino Lavallée gajnas 315-frankan libron.

Ni gratulas ĉiujn.

KONKURSO N° 10

Horizontale :

1. Scienco, kiu fiksas la daton de la historiaj okazoj.

2. Ejo, kie oni vendas podetale.

3. Cifero ; nearala ; litero.

4. Inverse : el kio, io elreliefiĝas (r) ; komenco de rivero ; konforma al la reguloj de la beleco (r).

5. Inverse : strio da tero tuŝanta etendaĵon da akvo ; longkvadrata peco el bakita argilo (r).

6. Turka greno (r) ; eligu harmoniajn sonojn.

7. Prefikso ; moviĝi al (r) ; inverse : supernatura estaĵo.

8. Litero ; religia kaj politika suvereno (r) ; fonetike laŭ la literoj : klara ideo pri io.

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10

1										
2		■								■
3			■						■	
4				■				■		
5							■			
6						■				
7				■				■		
8			■						■	
9	■									■
10										

9. Inklina akceptigi ion al iu (r).
10. Inverse : romkatolika monaĥo.

Vertikale :

- Tre preciza horloĝo.
- Portebla fotoaparato.
- Inverse : prefikso ; arkitektura ornamaĵo (r) ; inverse : participa finaĵo (r).
- Ne alie ol ; inverse : litero ; moviĝi al.
- Inverse : horizontala tabulo ; inverse : aŭdigi obtuzan bruon.
- Rokkolombo (r) ; provizu per forta barilo.
- Numerala adjektivo ; interjekcio esprimanta surprizon ; transigo en difinitan lokon (r).
- Litero ; itala riverego ; fonetike laŭ la literoj : ĝenerala vivmaniero de iu popolo.
- Greno (r).
- Inverse : kondukisto.

Bonvolu sendi viajn solvojn antaŭ la 25-an de la venonta monato al S-ro Guillot, Professeur, 1, rue de la Paix, Gaillard, (Hte-Savoie).

ZAMENHOF-MONUMENTO

(starigota en Wien en 1958)

Zamenhof vivis en Vieno de 1888 al 1897 kaj tie studis oftalmologion S-ro Kortega Konsilisto Hugo Steiner, direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien iniciatis kreon de Zamenhof-Monumento starigota en Vieno. Necesas sumo de 40.000 ŝilingoj. La kolekto komencas kun 6.000 S. Sendu vian obolon al I.E.M. Wien, I, Hofburg, Aŭstrio.

PERANTOJ DE I. P. R.

AUSTRA : O. St. R., Dr. E.J. GOERLICH, *Wien*, IX. *Waehringerstrasse* 59. (Poŝtĉeka konto : 30.461).

Jarabono : 32 aŭstraj ŝilingoj.

BRITA : « *The British Esperanto Association* », 140, *Holland Park Avenue*, *London*, W 11.

Jarabono : 8 ŝilingoj.

BULGARA : *Bulgara Esperantista Asocio*, *Sofia*, Bul. *Stalin* n° 40.

Jarabono : 8 levoj.

DANA : « *Dansk Esperanto-Forlag* », *Ingemannsvej* 9, *Aabyhof*. (Ĉek-konto : 16.295).

Jarabono : 8 kronoj.

GERMANA : *Helmut ROSSLER*, 22 b. *Hechtsheim bei Mainz*, *Friedensstr.* 15. Ĉek-konto : 43 357 *Ludwigshafen/Rhein*.

Jarabono : 4.8 germanaj markoj.

HISPANA : *E. CALVET*, Pl. *Gral Sanjurjo*, 7, *Tarragona*. (Konto n° 956-293 ĉe « *Banco Espanol de Credito* »).

Jarabono : 44 pesetoj.

ITALA : *Eduardo ZUMBO*, *Casella postale* 226, *Torino*.

Jarabono : 700 liroj.

JUGOSLAVA : *Josip VAJDLIH*, *Podolje* 15, *Zagreb*. (Ĉekkonto : *Gradska ŝtedionica Zagreb*, 40-KB-6 n° 4653).

Jarabono : 330 dinaroj.

NORVEGA : *Erling HOLTEN*, *Leangen i Strinda*.

Jarabono : 8,50 kronoj.

NEDERLANDA : *S-ro VERBRUGGE N*, *Oosterhesselenstraat* 560, *Den Haag*.

POLA : « *Asocio de Esperantistoj en Pollando* », ul. *kozia*, 3, *Varsovio*.

Jarabono : 40 zlotoj.

SOVET-UNIA : *Roberto DVORKIN*, *Esperanto-Sekcio de Kulturdomo*, *Leningrad*, 22 *Kirovskij* 42.

SUOMA : *Joel VILKKI*, *Somero*, poŝtkonto : Tu 60 253.

Jarabono : 300 suomaj markoj.

SVEDA : « *Eldona Societo Esperanto* », *Box* 19071, *Stockholm* (Poŝtĉeka Konto : 578)


Jarabono : 6 kronoj.

USONA : *Jarvis E. BUSH*, 3.700 *North 75-th Street*, *Milwaukee* 16, *Wisconsin*.

*
**

ALIAJ LANDOJ : Sin turni al nia administranto : *E. BIDOIT*, 6 *rue de la Paix*, *Baugé* (M.-et-L.) *Francio*. (Poŝtĉeka konto : 143-867 *Nantes*). Provizore la landaj perantoj kaj ĉefdelegitoj de U.E.A. peras la abonojn. Jarabono : 400 francaj frankoj aŭ egalvaloro.

Ni daŭre serĉas perantojn.



La Esperantista Kulturdomo

Kastelo « GRÉSILLON »
BAUGÉ (M.-et-L.) Francio

Tél. 34

FRANCA KULTURDOMO

Restadoj dum somero 1957

La Kastelo Grésillon estos malfermita de la 1-a de Junio ĝis la 14-a de Septembro 1957.

1-a Periodo : 1-an de Junio — 14-an de Julio

Kursoj de Esperanto por komencantoj — Instruado de amatora bindarto
Turismaj karavanoj

2-a Periodo : 14-an de Julio — 24-an de Julio

Sensacia Manifestacio :

Kulturaj Internaciaj Ferioj

Kun Profesoroj AULD, LAPENNA, WARINGHIEN,
Dro ALBAULT kaj Ing. WATIER

3-a Periodo : 25-an de Julio — 10-an de Aŭgusto

La Franca Lingvo

por alilandaj samideanoj

Eksterordinare bona metodo por instrui rapide la francan lingvon pere de Esperanto, kursoj por komencantoj kaj por perefktigemuloj. Necesas uzi sufiĉe bone Esperanton.

4-a Periodo : 10-an de Aŭgusto — 31-an de Aŭgusto

Somera Lernejo - Tri kursoj de Esperanto

5-a Periodo : 1-an de Septembro — 14-an de Septembro

Fakaj Renkontiĝoj - Liberaj Ferioj